



Kulturaj Kajeroj

É. MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj EPINEUX-LE-SÉGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

JARABONO :

Sendotaj al : Micard Henri
« Kulturaj Kajeroj »
Epineux-le-Séguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62

Simpla : 7 fkoj }
Bonfara : 12 fkoj }

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

NOVEMBRO - DECEMBRO

1965

6

KULTURAJ KAJEROJ

1965

Novembro - Decembro

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatoj :

Paul Guillot
Frédéric Thebaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El la Kulturdomo

Esperanto tra la mondo

A. Frangeul

El la lando de la 51-a U.K.

La savanto de la patrinoj

D-ro Marton

El prelego

Efiko de la parolo

G. Roux

Monda problemo :

Nutri la homojn (II)

B. Cheverry

El Britujo

Pri pontoj

S-ro Fooler

La Kuracisto en la Opero

Dr Schweisheimer
(trad. Dro Dumas)

Fantaziaĵoj

Homo-Kiel maŝino

H. Chavan

Por via distro

Nia konkurso

P. Chevalier
B. Jarlier

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzajn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.



KULTURAJ KAJEROJ

**deziras al ĉiuj siaj amikoj feliĉajn
tagojn dum la venonta jaro.**

El la Esperanto-Domo

Ni pensu pri la venonta jaro

La Administra Konsilantaro de la Esperanto-Domo dankas ĉiujn partoprenantojn de la pasinta somero kaj ĉefe ĉiujn, kiuj afable skribis al ni por diri kiom agrablaj estis la tagoj travivitaj en Grésillon. Tiaj leteroj kuraĝigas nin kaj iom malpezigas nian laboron.

La ĝenerala programo 1966-a estas jam preta. En Aprilo (Paskaj ferioj), de la 1-a ĝis la 8-a, la nun mondkonata Kultura Semajno, ĉefe dediĉita al la junularo, prezentos kursojn kaj prelegojn. Jam certa estas la partopreno de pluraj dekoj da gejunuloj, estontaj ĝeinstruistoj.

En Julio, ĝis la 24-a, okazos la kutimaj kursoj : porkomencanta (gvid. F-ino Vazon) ; supera (gvid. S-ro Ribot) ; praktika kurso, gvidata de S-ino Major el Londono, bone konata esp.-instruistino, kiu en pluraj landoj lerte kaj vigle gvidis kursojn. Ĉe la fino de tiu periodo okazos la kutimaj ekzamenoj : Atesto pri Lernado, Supera Atesto, Atesto pri Kapableco, Internacia Atesto. Kompreneble ankaŭ ekskursojn oni planis.

De la 24-a de Julio ĝis la 7-a de Aŭgusto, la vizitantoj povos aŭskulti valorajn prelegojn diversetajn prezentitajn de prelegantoj ŝatataj de tiuj, kiuj jam havis la plezuron ilin aŭdi. La detala programo aperos komence de Januaro. Samtempe okazos diversaj ekskursoj kaj antaŭ

la periodo, kiel lastan jaron, ni planis dutagan viziton de Parizo.

En Aŭgusto (7-28) la ĉiam sukcesplenaj Kulturaj Semajnoj kunigos la ŝatantojn ne nur de Esp.-kursoj sed ankaŭ de bindarto kaj korbofarado. Tiujn Kulturajn Semajnojn sekvos la UFE periodo kun kursoj kaj ekskursoj (ĝis la 11-a de Septembro). Se la nombro de la petoj estis sufiĉe granda, la Kastelo estos malfermita ankaŭ post tiu periodo por la gesamideanoj de zirantaj ripozi.

Cu estas necese aldoni, ke la kastelo kaj ĝia parko estas ege agrablaj, ke la vesperaj aktivaĵoj estas interesaj kaj amuzaj ?

La Kultur-Domo faras sian eblon por kontentigi ĉiujn kaj ŝajnas, ke, ĝis nun, ĝi sukcesis. Sed ĝi bezonas vian helpon, ĉar kiu povas helpi pli bone ol ĝiaj amikoj ? Unue kompreneble vi povas helpi per via vizito. Sed vi povas utili ankaŭ alimaniere : per propagando. Konigu niajn aktivaĵojn al viaj amikoj aŭ samgrupanoj. Instigu ilin veni al Grésillon. Disdonu la informfoliojn al la interesatoj ; ni povos sendi al vi kelkajn ekzemplerojn se vi deziros tion fari. Aŭ donu al ni la adresojn de gesamideanoj, kiuj ŝatus viziti nin, kaj ni sendos al ili ĉiujn informilojn. Ni antaŭdankas vin. Kaj vi, kiu jam venis al Grésillon, vi scias ke estas necese rezervi ĉambrojn tre frue. Do, tuj informigu !

Esperanto tra la Mondo



KONGRESOJ KAJ RENKONTOJ

Budapeŝto. — Jam aperis la unua bulteno pri la Universala Kongreso. Adreso de la sekretario : Kongreso de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Por niaj francaj legantoj : UFE, 34, rue de Chabrol, Paris-10^e, organizas karavanon tra Germanio, Ĉeĥoslovakio, kun reveno tra Aŭstrio kaj Svisio.

Graz (Aŭstrio). — La konferenco por Esp. instruistoj okazos de la 23-a ĝis la 28-a de Julio. Adreso : Lerneja Esperanto-Konferenco 8046, Graz.

Swanwick (Britujo). — De la 23-a ĝis la 30-a de Julio okazos SAT-Kongreso. Adreso : 27, Argyle Road, Cranbrook, Ilford (Essex) Britio.

Abelboden (Svisio). — Skirestado de la 26-a de Decembro ĝis la 4-a de Januaro. Adreso : S-ino A. Gacond, Miéville 133, 2314 La Sagne, Svisio.

Krimml (Aŭstrio). — de la 19-a ĝis la 26-a de Decembro kaj de la 26-a de Decembro ĝis la 4-a de Januaro. La franĉoj skribu al : Josette Bernier, 190 bis, avenue de Clichy, esc. 3, Paris-17.

Utrecht. — 18-a Internacia Fervoja Esperanto-Kongreso, de la 14-a ĝis la 20-a de Majo. Adreso de LKK : W.L. van Leeuwen, Stationplein 25, Amsterdam (C), Nederlando.

NOVAĴOJ EL...

Moskvo. — Pluraj libretoj aperis depost kelkaj monatoj sub la respondeco de Komisiono pri internaciaj Ligoj de sovetaĵ esperantistoj. Ni citu : « Por la Paco », « Elektitaj versaĵoj de Lermontov », « Kantoj de sovetaĵ komponistoj », « La sorto de Homo », de Mikail Solokov, « Janis Rainis », latva popola poeto. Adreso : ul. Kalinina 14, SOD, Otdel kultury, Moskvo.

Nov-jorko. — Tie komenciĝis nova kurso por la oficistoj de U.N.

Suda Koreujo. — Fondiĝis nova organizaĵo, « Korea Esperanto-Societo », kiu ĵus aliĝis al la monda organizaĵo.

Norda Koreujo. — Aperis el ŝtata eldonejo nova 350-paĝa vortaro Esperanta-Korea.

Mongolio. — Aperis la unuaj lernolibroj kaj vortaro de Esperanto por Mongoloj, ambaŭ eldonitaj de la ŝtata eldonejo.

Pekino. — Daŭre aperas eldonaĵoj de politikaj broŝuroj kaj elsendon de radio-programoj en Esperanto.

Orienta Germanio. — La Esperanto-movado estas nun oficiale agnoskita ; ĝi ricevis fortan monan apogon. Oni anoncas presadon de revuo, vortaroj, lernolibroj kaj la kursoj estas multe vizitataj.

Brazilo. — Televida kurso de la internacia lingvo Esperanto, verŝajne la unua tiaspeca en la mondo, okazis antaŭ nelonge en Sao Paŭlo, sub la respondeco de la ŝtata Sekretariejo pri Edukado.

Bern. — La Svisa Kurtonda Radiostacio rekomencis siajn elsendojn en Esperanto. Sendu vian opinion pri la aŭskultado al : Svisa Kurtonda Radio, Esperanto-fako, Giakomettistr. I, 3000 Bern 16.

FAKOJ

Asocio por Invalidoj. — En Danlando fondiĝis movado por invalidoj kaj kripluloj, kies tasko estos peri interkonon inter kripluloj kaj invalidoj de la tuta mondo. Adreso : Lavespa, S-ro M.M. Heidun ; Ellemarksvej 12, Earhus, Danio.

Komerca Fako. — Fondiĝis « Impekso », Moerweg 111, Hago, esperanta oficejo por imkaj eksportado.

Asocio por la skoltoj. — La Skolta Esperantista Ligo, eldonis 4-lingvan faldfolion propagandan kaj regule publikigas revuon. Delegitoj mankas, inter aliaj landoj, en Francio kaj Germanio. Adreso : S-ro J.K. Hammer, Wibautstraat 49, Zandaam, Nederlando.

RICEVEBLAJ FALDFOLIOJ

Vi povas peti kvanteton de la subaj faldfolioj por viaj lernantoj viaj klubanoj aŭ propagandcelo.

— « Berlin ». Adreso : Verkehrsamt Berlin, 1 Berlin 12, Fasanenstrasse 7/8.

— « FIAT : Tero, Maro, Cielo » kaj « FIAT 850, aŭto plej aktuala ». Sendataj de FIAT, Direzione stampa e propaganda, Corso G. Agnelli 200, Torino.

— Ilustrita faldfolio pri la esperanto-tendaro de Primošten, en 7 lingvoj. Adreso : Internacia Esperanto-Somerumejo, Primošten, kod Sibenik, Jugoslavio.

— Ilustrita programo de la elsendoj en Esperanto de la Pola Radio. Adreso : Pola Radio, Esperantaj Disaŭdigoj, Varsovio, Pollando.

— Ilustrita libreto « Hispanio por vi », eldonita de : « Subsecretaria de Turismo, Madrid.

El la lando de la 51-a U. K.

LA SAVANTO DE LA PATRINOJ

Antaŭ cent jaroj mortis la hungara kuracisto, F. Ignaco Semmelweis, kiun prientatas la tuta mondo, kiel savanto de la patriinoj. Eĉ UNESCO la jaron 1965 dediĉis al lia memoro; kaj tiel ne nur en Hungarlando, sed ankaŭ tutmonde oni rememoras la divenanton de la sekreto de timiga akuŝfebro.

Semmelweis naskiĝis en jaro 1818 — en urbo Buda. Post la akiro de medicina diplomo li laboris ĝis jaro 1850 en kliniko de Vieno, ja dum tempo de aŭstra-hungara monarkio, tiu urbo estis la spirita centro de l'imperio. Li estis flagrantanima, maltrankvile kaj senlace laboris en la akuŝklinikon kaj serĉis, kio estas la kaŭzo, ke 32 % de la akuŝantaj virinoj mortas pro febro. Kial oni povas malhelpi, ke junaj virinoj kun la ĝojo de la patrineco povu forlasi la hospitalojn? Oni devas serĉi la kaŭzon, kio ajn estu ĝi; ĉu veneno devas esti, eĉ ĝi estas en la hospitalo, ĉar li spertis, ke la granda plimulto de la virinoj, kiuj hejme naskas siajn idojn, ne mortas.


En la jaro 1850 li fariĝis privatdocento en la kliniko por akuŝantinoj. Lian esplorlaboron oni ne subtenis kaj parte pro la humiligaj kondiĉoj, parte pro sopiro al sia patrujo, li rezignis kaj revenis al la hungara ĉefurbo. Post lia reveno oni nomis lin ĉefkuracisto kaj gvidanto de la akuŝantina sekcio de la Rokus-hospitalo. Tie li tuj uzis sian metodon. Kio estis? Li observadis ke la medicinaj studentoj post la sekdado de kadavro faras siajn medicinajn vizitojn ĉe la akuŝantaj virinoj, venis al la penso, ke iuj putrantaj organikaj povas kaŭzi la mortigan malsanon. Do, per putrantaj organikaj malpurigita mano de medicinisto infekti la akuŝantinojn. Lia metodo? manlavo per klora akvo antaŭ ĉiu medicinista vizito ĉe gemalsanuloj. Al Semmelweis estas dankebla, ke en la mondo, la kliniko hungara estis la unua, kie jam antaŭ la scienca malkovro de la grandaj talentoj de Pasteur kaj

Lister oni adaptigis al konsekvenco de asepto.

Ekkono, propono kaj metodo de Semmelweis ŝajnis primitiva por la sciencaj fakuloj de la epoko. Nur la plej elstaraj estis kapablaj sen vanteco kaj faka ĵaluzo akcepti lian malkovron kaj samtempe memkritike kaplini antaŭ la pezgrava vero, ĉar sekve de ilia malklereco ĝuste ili, la kuracistoj, estis la murdistoj de siaj malsanuloj.

Dum lia sesjara agado el 933 akuŝoj entute nur 24 mortis dank'al uzigo de metodo de Semmelweis. Do en lia kliniko nur malofte mortigis tiu malsano, dum en aliaj hospitaloj furiozis la akuŝ-febro. Per sciencaj argumentoj en la praktiko li pruvis, ke la akuŝfebro ne estas infekta malsano, sed pie-mio (pus-sangado).

En jaro 1855 li fariĝis universitata profesoro. De tiu tempo li prelegis ne nur por la studentoj, sed ankaŭ al la publiko. Li ne ŝatis skribadi, sed pro instigo de liaj amikoj



Poŝtmarko eldonita de la Hungara Poŝto okaze de la centjara datreveno de la morto de Semmelweis.

li raportis pri siaj rezultoj en hejmlandaj kaj fremdlingvaj fakrevuoj. Li atendiis la atenton de la alilandaj medicinistoj. Sed, kiel ĉe tiom da grandaj inventistoj, ni pensu nur pri Dro Zamenhof, nur malmultaj rekonis la pravecon de lia eltrovo. Tamen li eldonis sian ĉefverkon pri la patologio kaj profilaktiko de la akua febro. Li klarigis en ĝi, ke krom la kadavra veneno, ankaŭ ĉiuj aliaj putrantaj organikaj povas kaŭzi la mortigan malsanon. La troa laboro, la indoleco, la daŭraj prizorgaj pensoj por la patrinoj, miskomprenoj kaj intrigoj ruinis lian nervsistemon. Li mortis en malsanulejo por nervmalsanuloj kaj mensmalsanuloj en la jaro 1865, nur 47 jara.

Nur post jardekoj — post la malkovro de bakterioj — klarigis la genio de lia instruado. Lia tragika morto rilatas al lia vivdestino. Semmelweis estas la grandulo de instruebla destino de kuracigo kaj de profilaktiko. Ne la scienca scivolo instigis lin, sed la kompato. Li aplikis ĉiun rimedon de la tiama scienco, por ke pruviĝu per lia menso tio, kion li malkaŝis per sia koro.

Ĉefverko de lia vivo hodiaŭ klare staras antaŭ la posteularo. Oni alte takas lian sciencan laboradon kaj la fakton, ke li antaŭ la eltrovo de la bakterioj jam elkonis la sepson kaj la konstruasepson kaj savis la portantojn de la vivo de la estonta generacio. La mortiga akua-febro ja, kiu en mezo de pasinta jarcento okazigis la vivperdon de ĉiu 4-a — 5-a akusantino, esence ĉesis en ĉiu lando de la mondo. Hodiaŭ el la akusintoj en la tuta mondo apenaŭ 4-5 procentoj mortas pro tiu mortiga febro. Por tiu rezultato ne nur la medicinistaro, sed ankaŭ la tuta homaro esprimas sian dankemon al memoro de Semmelweis.

Li estas enterigita en la muroj de la naskiĝdomo. Antaŭ ĝi staras la statuo de la « patrino ». Lia naskiĝdomo fariĝis medicina muzeo !

Je lia memoro okaze de la centjara datreveno de lia morto estis solena kunsido en la Hungara Scienca Akademio.

DRO L. MARTON.



NE FORGESU, ke tiu ĉi numero estas la lasta de la jaro.

Cu vi reabonis ?

Cu vi abonigis viajn amikojn ?

Vidu la liston de la perantoj sur la lasta kovrilpaĝo.

Atentu pri la novaj prezoj.

Z

Efiko de parolo

Tre longtempe, la parola lingvo estis la nura rilata rimeno inter la homoj por la vivnecesaĵoj. Poste, ĝi fariĝis fizika plezuro eligi sonojn okazigantajn pli proksimajn rilatojn, komprenon pli nuancigitan, pli agrablan, (kvankam Talleyrand diris, ke la homo uzas lingvon por kaŝi sian penson). Ankaŭ plezuro estas paroli al si mem aŭ al besto por tiu, kiu nekonscie serĉas kontakton kun vivanta estaĵo.

Ankaŭ estas plezuro por la aŭskultanto, plezuro de mensa ĉeesto, plezuro de la bebo, kiu ĉesas plori, kiam ĝi aŭdas plaĉan voĉon. Krom la senco de la vortoj, estas muzika plezuro tiel granda por infanoj, kiuj multe ĝuas la ripetigantajn sonojn aŭ frazojn de la specialaj infanecaj versaĵoj aŭ rakontetoj kaj kiuj senfine petas samajn ŝatatajn songrupojn aŭ rakontetojn.

Same por plenkreskuloj estas plezuro klopodi partoprenigi, ĝuigi aliajn pri la nuna temo, interŝanĝi ideojn. Pri tio Montaigne (1532-1592) skribis « sian ĝojon froti sian ĉerbon kontraŭ tiu de alia, sian guston de la kontraŭdiro, kiam la kontraŭulo estas bone edukita, kaj sian plezuron, kiam tiu lasta estas valora homo »

Tute aparta estas la arto de la oratoro, kiu parolas al homamasoj cele al politika aŭ religia propagando aŭ cele al vendado. Pri tiu lasta punkto la legado de « Kredu min, sinjorino ! » de Rossetti estas ege interesa.

« Nun, mi rakontas ion al vi ! » estas vortoj, kiuj ĉiam vekas la interenson de la aŭdantaro, kiu ajn estas ĝia aĝo kaj la senco enmetita en tiu « io ». Rakonti estas vera arto. Iam Homero parolis pri « flugilhavaj vortoj ». La bibliaj profetoj en siaj bildoplenaj kaj simbolaj rakontoj uzis tiun magion de la vorto. « En la komenco estis la Vorto kaj la Vorto estis kun Dio, kaj la Vorto estis Dio », kiel dirite en la Nova Testamento.

Pli malfrue oni legas : « la Vorto enkar-niĝis ». Sankta Johano, la unua, donis tiun nomon al la dua persono de la Triunu, dezirante malkovri la sekreton de la eterna generado de la filo de Dio, simila al la produktado de la

mensa vorto en niaj intelektoj. Notinde estas, ke Platono konsideris Dion, kiel la fonton de la ideoj.

Kelkaj doktrinoj diras : Vorto estas Sorto.

Oni pensas pri la majstro-vorto de la sorĉistoj aŭ bonfara aŭ malfeliĉiga. Unu Vorto ! kaj la malbela bufo fariĝas belega princino aŭ la malbonulo estas tuj ŝtonigita. « Sezamo ! malfermu vin ! » kaj la pordo malfermiĝas. La kuracisto-sorĉisto prononcas vortojn, kaj la mal-sano malaperas...

Ankoraŭ nuntempe, la efiko de la vorto estas tre grava. Kelkaj triboj timas la tabuvortojn ; ekz. kiam Kafrinoj viriniĝas, kaj kiam ili edziniĝas, ili devas ne plu prononci iujn vortojn, kiujn ili antaŭe tute libere uzis pro pli malpli sekretaj kaj malsimplaj rilatoj kun la seksoj kaj supernaturaj fortoj ligitaj al la nomo aŭ ecoj de la edzoj. Tiu potenco atribuita al la Vorto estas eble nekonscia memoro de ĝia origina rita potenco.

De la Antikvaj Tempoj, la plezuro aŭskulti rakontojn estas granda kaj la rakontantoj, oni povas diri la rakontistoj, estis gravaj kaj famaj homoj, en Grekujo, Arabio, Bizanco... La ĉarmo de tiuj rakontoj estis ne nur en ilia enhavo sed ankaŭ en la ripetado de esprimoj, de frazoj, atenditaj de la aŭdantaro, samtempe ripozaj kaj enpenetrantaj en la spiritoj por bone enkapigi la parolan tradicion, en la miksiĝo de poezio, elokventeco kaj ankaŭ de muziko kaj de kanto. Same en sudaj landoj kiel en nordaj ekz. la Kalevala modulita dum balancado. Niaj historio-libroj montras al ni trobardojn kantantaj antaŭ la mezepokaj kastelanoj, kun muzikilo ĉe mane. Tiuj rakontoj estas valora parto de la literatura heredaĵo de ĉiu lando, de ĉiu popolo.

Sukcesplena rakonto devas tuŝi korojn kaj cerbojn, sentemon kaj intelektojn per sia temo : povas esti simpla rakonto : gestokanta, folkloro, moralo ; vera rakonto : historia, pri bestoj, pri vojaĝoj ; imaga rakonto : poezia, fantazia, anticipa ; simbola rakonto ; humura rakonto.

Sed ĉiam ricevema etoso estas necesa kaj parto de la rakonta arto estas krei tiun atendantan etoson antaŭ ol komenci paroli. Kiu ajn estas la rakonto, propra rakonto de la parolanto aŭ ne, tiu ĉi devas transdoni sian konvinkon, sian emocion al la aŭdantaro por ĝin kuntreni, sugestii, partoprenigi. Reciproke, la aŭdantaro influas la parolanton, spronas liajn talentojn. Li adaptiĝas al sia aŭdantaro ; ne tute konscie li vigliĝas, ludas rolon, mimikas, li fariĝas aktoro.

Dum jarcentoj, transdonitaj parole, la rakontoj vole aŭ nevole aliĝis aŭ por adaptiĝi al la publiko aŭ por flati la tiaman ŝaton. Iam oni plezure aŭskultis tre longajn rakontojn dum la vesperoj ; estis la sola ligilo kun aliaj homoj aŭ pasintaj aŭ fremdaj, kiujn nur vojaĝintoj povis priskribi. Pri imagaj rakontoj, oni konstatas similecon de temoj eĉ ĉe tre malproksimaj landoj ; unu inter multnombraj pruvoj de la simileco de la homaj konceptoj rilate al la bazaj virtoj. Nuntempe, longaj rakontoj ne plu estas aŭskultataj de plenkreskuloj, nur politikaj kon-

ferencoj, religiaj paroladoj aŭ lekcioj por studentoj.

Tamen ankoraŭ nuntempe en Italujo, estas mezepoka postvivado : rakont-kantistoj. En 1963, okazis en Gonzague, apud Padovo, kongresfestivalo de rakont-kantistoj el ĉiuj partoj de la lando. Tiu tradicio, precipe en Sicilio, originas, ke la etnologoj, de rememoro mistera de dia triunuo de la tero kaj printempo de greka epoko. La unuan dimanĉon de majo okazas strangaj ceremonioj : meze de la ĉiuspecaj konkursoj, procesioj, krioj, preĝoj, parolas la rakont-kantisto, ĉe mane gitaro aŭ tre malnova muzikilo uzata de paŝtistoj de la mediteraneo ĝis Hindio : metala triangulo kun langeto vibranta pere de metala najlo, lokigita en la buŝo, kiu rolas kiel resonanca kesto.

La plej malnovaj rakontistoj estas la blinduloj kantintaj naŭtagajn preĝojn (de la 8a de decembro, Senpeka Koncipiteco, ĝis Epifanio, tago de la tri reĝoj). Nun, konservante sian titolon de blinduloj, ili estas nur vojaĝantaj kantistoj. En Sicilio, estas nun kantistoj kaj rakontistoj. Kantistoj elektas temojn epokekavalierecajn de la Xa ĝis la XIVa jarcento en kiuj la popoloj esprimas siajn malmojn, dolorojn, deziron de justeco. Tiuj temoj estas renovigitaj por adaptiĝi al nuntempaj okazaĵoj. La rakontistoj estas la parolantaj kaj migrantaj gazetoj ; ili parolas pri la nuntempaj okazaĵoj, ne preterpasante la politikon, kaj sociajn problemojn eĉ kritikante la agadon de la estraro.

Ni ne forgesu, ke en Italujo, la parolado estas flua, la parolanto aktoro, kiu vivas sian rakonton, transdonas siajn sentojn per ludo de la voĉo, vizaĝesprimoj, emfazaj gestoj tiel impresaj, ke la virinoj forgesas infanojn, hejman laboron, la butikistoj sian klientaron kaj staras horojn aŭskultante la allogan rakonton, koroj premitaj aŭ plengorge ridantaj. La kantisto alvenas nun, ne plu sur azeno sed sur « vespa » aŭ aŭtomobile, kunportante sian laŭtparolilon, gitaron kaj desegnojn klarigantajn la rakontojn. Kelkaj el tiuj rakontoj estas registrataj kaj en Sicilio estas samtempe videblaj radio, televizio kaj malnovaj rakont-kantistoj.



« Vortoj estas muzika plezuro por infanoj »

C. ROUX.

MONDA PROBLEMO

NUTRI LA HOMOJN (II)

Car 1965 estas la jaro de Internacia Kunlaboro, la jaro en kiu sub instigo de la Unuiĝintaj Nacioj, ni turnu nin eksteren, kune, ni ekzamenu la eblecojn partopreni al plibonigo de la nutrado en subevoluintaj landoj.

Unuavide, facila solvo konsistis en rekta liverado, de la troaĵoj de unuj por kovri la

mankojn de aliaj. Sed, evidentigas, ke — pro diversaj kaŭzoj — tiu helpo-formo povas esti nur eksterordinara.

Sajnas, ke plej kontentinda estus malavara, internacia kunlaborado, kiu permesus al la helpataj landoj plibonigi mem sian produktadon sur sia propra tereno por ĝin altiĝi ĝis la nivelo de la bezonoj. Tia sistemo strikte aplikata garantius la ekonomian kaj politikan sendependecon de la beneficiuloj, kiuj tiamaniere, sentus sin ŝuldantoj al tuta internacia komunumo, sen aparta ligilo al iu ajn pruntedonanta nacio.

Jam, tia formo de helpado ekzistas kaj komencas funkcii, interalie sub impulso de UNESKO. En kadro de monda kampanjo kontraŭ malsato, kaj vera internacia kooperado de la koroj, de la spiritoj, de la fortoj, modernaj esplorantoj, junaj sciencaj serĉistoj aŭ agronomoj surloke studas rimedojn por transformi tropikajn dezertojn en riĉoplenajn grenejojn.

Juna fizikisto el Argentino, tiel difinas sian metion : La metion de serĉisto — li diras — oni lernas ne nur en la libroj. Ĝi postulas ion specialan : miksaĵon de kuriozeco, pacienco, emo al ekzakteco. Plie, sciencisto, kiu entreprenas, kaj aplikas serĉadojn, neniam devas forgesi, ke inter la scienco kaj la homaro estas konstantaj interagadoj. Ĉiumonente, li devas plene konscii pri siaj respondecoj.

Estas serĉistoj en ĉiuj branĉojn de Aplikata Scienco. Tiuj, kiuj, inte-



resas nin hodiaŭ, en kadro de kultur-establoj en subevoluintaj landoj, estas la pioniroj, kiuj nomiĝas « pedologiistoj ». Kio estas pedologio ? Tute simple, la scienco pri grundoj. Kontraŭe de la geologiistoj, kiuj ĝisfunde studas terenojn, rokojn, kaj tiel plu, por malkovri kion ili entenas, la pedologiistoj studas nur la kultureblan surfaceton de tero por scii kion ĝi povas (aŭ ne povas) elkreskigi. Sekve, pedologiisto neniam fosas pli ol 4 aŭ 6 metrojn profunde. Tamen, tiu specialisto pri solo estas sangigema, kiel kameleono. En laboratorioj, li surmetas blankan surtuton kaj analizas solerojn pere de radiografiaj aparatoj ; sur la tereno li estas vestita, kiel teraĵisto, same ŝvitas manipulante fosilojn. Antaŭe, li devis ne nur studi pri fiziko, kemio, biologio, sed ankaŭ pri geografio, historio, ekonomio, sociologio. Plej necesas al li, okuloj de pentristo por diferencigi dekojn da koloroj en tero, kiuj al ni aspektas nur unukolora, aŭ flava, aŭ bruna ; tuŝosenso de manlaboristo por identigi la teksturojn de la solo. Fine, bonstato, kurago, persistemo, kiam, esploranto kaj kartografisto, li devas trakuri kilometrojn post kilometroj, jen piede, jen aŭtomobile... kelkfoje sur dorso de kamelo aŭ ĉevalo — landoj sen vojoj — por desegni mapojn de regionoj ankoraŭ neniam pristuditaj de pedologia vidpunkto.

— Fakte, se, jam, oni multe klopodas por ekkoni la konsiston de la lun — kaj Mars — grundo, oni ankoraŭ multe ignoras pri tiu de nia propra sfero !

Kaj, eĉ en eŭropaj landoj, kie intensa

kulturado postulas maŝinojn, kemiajn sterkojn, sem-selektadon, oni bezonas pedologiajn konojn pli kaj pli precizajn. De nun, la konsiderindaj progresoj realigitaj en tiu scienco permesas kontroli la « faktorojn de fekundeco », kiuj en la pasinteco, limigis la produktokvanton. Tiamaniere, en Francujo, ekzemple, oni nun povas rikolti abundan kaj belegan tritikon sur kelkaj terenoj de Campanio kaj obtieni riĉan rikolton de maizo sur la dun-sabloj de la departemento « Landes ».

Do, kiom utila povas esti tiu scienco aplikata al tropikaj landoj ankoraŭ ege malbone konataj, kiam plej necesas plibonigi malnovajn kampojn, kaj krei novajn !

En tiuj regionoj — la tiel nomataj « landoj survoje al evoluado », ekkono kaj takado de la naturaj riĉaĵoj havas konsiderindan gravecon, ĉar se poste, ilia ekspluatado povos ludi ĉefan rolon en la landa ekonomio, de nun, ili devas kovri la nutrajn bezonojn de la indiĝenoj.

Resume, la pedologia esplorado estas la unua paŝo al valorigado de la terenoj, estantece kaj estontece, dank'al studoj eĉ la tereno mem, kaj al starigado de grundo-mapoj, plej ofte desegnitaj pere de aviadilaj fotoj kiuj, funde pristuditaj pere de stereoskopo kiuj aperigas la reliefon, permesas redukti la nombron de la sondadoj eĉ la tereno, kaj malkovri ĉiujn eblecojn de la naturaj riĉaĵoj, eĉ akvaj, kiel eĉ la bordo de lago Ĉad (Tchad).

B. CHEVERRY.

EL BRITUJO

La Kultura en la Opere

Pri Pontoj kaj legendoj de Londono

« Rompiĝis la Londona Pont' »
Gajulino

Rompiĝis la Londona Pont' »
Refaru ĝin per buterpan' »
Buterpan' »
Buterpan' »
Gajulino ! »

Tiel kantas anglaj infanoj. Kaj francaj kantas :
« Sur la pont'Avignon oni dancas, oni dancas »...
Sur la ponto de Avignon, tie proksime de la malnova kastelo de la Papo. Kaj la papo nun portas la titolon de « Pontifex », kiu signifas « konstruanto de pontoj ». Do, pontoj, ja, estas gravaj, Bildigu al vi Parizon, aŭ Stockholmon, aŭ Budapeŝton, aŭ multajn el la ĉefurboj de Eŭropo, kaj vi unue ricevos en la imagon bildon de iu ponto.

Por multaj eŭropanoj, la vorto Londono tuj projekcias sur la mensan ekranon bildon de « Tower Bridge ». El la sep pontoj de Londono ĝi staras plej proksime al la maro. Por multaj eksterlandanoj « Tower Bridge » staras kiel simbolo de Londono. De la vidpunkto de la inĝenieroj, ĝi estas interesa konstruaĵo. De la vidpunkto de la infanoj, ĝi estas mirindaĵo. Tiom ekscitegas estas vidi tiun straton kiu dividiĝas en du kaj leviĝas por fari spacon por ŝipo ! Tamen, « Tower Bridge » ne estas bela. Ĝi ne estas antikva — nur sepdekjara. — Antaŭ ol oni konstruis ĝin, estis tunelo ĉe preskaŭ sama loko, nur por piedirantoj, sub la Tamizo. Ties enirejon oni eĉ nun povas vidi sur Tower Hill — ĝi estas malgranda kiosko. La tunelon mem oni nun utiligas kiel truon por diversaj tuboj kaj dratoj kiuj devas ligi la du flankojn de la Tamizo.

For de tiu malbela ponto, ni forrapidu por trovi la plej gravan, la plej malnovan, la plej interesan el ĉiuj niaj sep pontoj. Pri ĝi ekzistas legendo, kiun ni rakontos al vi, ĉar eble Chesterton pravis kiam li diris, ke la legendoj entenas pli da vero ol entenas la historio.

Foje, antaŭ multaj jaroj, ekzistis nenia ponto inter Londono kaj la suda bordo de la rivero Tamizo. Por la vojaĝantoj, kiuj volis transiri la riveron ekzis-

tis nur pramo. Ties posedanto estis viro, kiu amis nur du aferojn : la monon kaj sian flinon. Edzinon li ne plus havis. Si mortis tuj post la naskiĝo de ilia sola infano. La viro estis tre riĉa, ĉar nur li havis la rajton funkciigi pramon tie, kie nun staras la Londona Ponto. Kiel vi bone komprenos la nombro de vojaĝantoj estis granda, ĉar Londono estis jam grava urbego. Pro tio la klientoj neniam mankis al la pramsipo, aŭ tage aŭ nokte, kaj la pramposedanto devis dungi diversajn virojn. Tamen, kvankam li kolektis multe da mono de la klientoj, li pagis al siaj pramistoj, kiom eble plej malmulte da salajro. Li devis ankaŭ doni al ili manĝaĵojn. Tiam estis la kutimo, sed li, aĉetis por ili nur malfreŝan panon, malmolan ŝiman fromaĝon kaj iom da tre malforta biero al kiu li ĉiam aldonis egalan kvanton da akvo de la Tamizo. Eĉ tiel, kvankam pli kaj pli riĉa, li ne estis kontenta. Ĉiutage, li elpensis novan razon por ŝpari monon, aŭ novan artificon por gajni ĝin. Tiam tagon genia ideo trafis lin : li diros al siaj dungitoj, ke li estas malsana, kaj post kelkaj tagoj sendos sian serviston por diri, ke li mortis. Tiam, por respekto al la mortinto, ili devos fasti. Kaj tio ŝparos monon. Tiel li do agis. Li kuŝis sur sia lito vestita per mortkitelo kaj la pramistoj vizitis la kvazaŭkadavron. Sed, ho ve ! Ili tute ne volis fasti ! Male, ili volis festi ; Ili iris rekte al la kelo por trovi la barelojn da bona, senakva biero. Ili komencis trinki, daŭre trinkis. Ili komencis ebrigi. Ili kantis. La kadavro aŭdis ke ili bruas kaj ridas, kaj komprenis ke lia ruzo malsukcesis. Li tiom ĉagreniĝis pro malŝparo de sia biero, ke li ĉion alian forgesis. Vestita per sia mortkitelo, li malsupreniris laŭ la ŝtuparo kaj laŭte kriis. Vidante lin, la ebruloj konsterniĝis. Ili kredis, ke li estas fantomo. Ili timis, kaj preskaŭ svenis. Inter ili nur unu havis iom da kuraĝo. Eble li estis iom pli ebria ol siaj kunuloj. Li prenis remilon, kaj forte frapis la fantomon. Tiom forte li frapis, ke ĉi-foje la avarulo kuŝis vere morta ! Lia filino heredis lian tutan havaĵon. Tamen, ŝi tiom ŝokiĝis per la tragedio, kiun ŝi ĉeestis, ke ŝi elektis farigi monahino. Ŝi fordonis sian monon por de celoj. Unue por fondi monahinejon, kie nun staras la katedralo de Southwark, kies priorino ŝi estiĝis ; kaj de por konstrui ponton... la unuan Londonan ponton.

Sinjoro FOOLER, el Londono.

La Kuracisto en la Opero

La Ĉarlatano rolas pli “drame”

*Neniam mi estus devinta fariĝi Kuracisto, Nikolao !
Mi estas ĝentlemano, poeto !
Kio estas nuda korpo por kuracisto ?
Plurfoje ripetiganta spektaklo, ĉiutage !
Sed en brilega dancsalono,
Kun bela muziko, kaj dolĉa parfumo,
Vidi ŝultron aŭ brakon nudan,
Frenzigas min !...*

Tiel kantas iom ebrigiĝinta Doktoro, dum ĉampan-vespero kun amikoj, en « Vanessa », opero de S. Barber, libreto de G. C. Menotti : li devas ekzameni junan virinon, suferantan de okazigita aborto, por certigi ke ŝi, almenaŭ fizike, ricevis neniam domaĝon.

Malmulte da operoj enscenigas doktoron. Tamen kuracisto ricevas multan laboron en la « granda opero » kun tiom da mortontoj kaj vunditoj. Sed la pensmaniero de scienculo ne estus taŭga por la opero, en kiu, la heroismo altiĝas je grado tia, ke ĝi ne povas kontraŭstari klinikan argumenton.

Pli taŭga por la farsopero estas lia rolo. En la « Frizisto de Seville », de Rossini, kaj en la « Edziĝo de Figaro » de Mozart, ambaŭ ellibretigitaj el Beaumarchais, estas Doktoro Bartolo, maljuna kalva homo, kiu, atenteme observas sian belan kuratoratinon, Rozino, kaj esperas edziĝi al ŝi.

« Kuracisto kaj Apotekisto », de Karl Ditters von Ditterdorf, estis unufoje ludata en 1786. La kampa-ra doktoro kaj la vilaĝa apotekisto barakatas furioze... Sed sen sango-elflue. La freseco kaj la malafekteco de la fikcio, kune kun agrabla muziko, vekis grandan entuziasmon en Anglujo kaj Germanio. Cetere, Ditterdorf naskita en Vien, pli famiĝis dum sia vivo ol liaj samtempoj Haydn kaj Mozart.

Tuberkuloza Primadono

La heroino de « La Traviata » de Verdi, kaj « la Bohemio » de Puccini, suferas pro rapidega ftizo. En la lasta akto de « La Traviata », la kuracisto provas trankviligi Violetta-n, mortantan, samtempe konfesante al la servistino, ke ŝia mastrino estas mortonta post kelkaj horoj. En « la Bohemio », la kuracisto ne persone aperas, sed la filozofo Colline, amiko de Mimi, kantas la faman arion, en kiu li anoncas sian intencan garantidoni sian mantelon, tiel ke vizito de kuracisto kaj kuraciloj estu pagitaj helpe al lia mortonta amiko.

La rolo de Doktoro Spinelloccio, en la unuakta opero « Gianni Schicchi » de Puccini, ne estas malplena je humoro. Lia kliento, Sro Donati, ŝus mortis, sed liaj heredantoj deziras kredi ke li ankoraŭ vivas, tiel ke ili povu ŝanĝi lian testamenton, kiu ne favoras al ili, antaŭ ol la notario ĝin vidu. Tial, kiam la kuracisto venas por sia ĉiutaga vizito, oni ne permesas al li eniri la ĉambron, kaj oni akceptas lin, asertante ke lia kliento tute bone fartas kaj resaniĝis tiam. La Doktoro, konstatas, ke neniu el liaj klientoj mortas, ĉar li tro bone kuracas ilin.


La Doktoro Malatesta (Kapdoloro), en la « Don Pasquale » de Donizetti, estas pli saga homo. Lia amiko, kaj kliento, Don Pasquale de Korneto enamiĝis al junulino, kun la plena ardo de siaj sepdek jaroj. Inĝenia fikcio, al kiu partoprenas aktive Doktoro Malatesta, rehavigas al la maljuna vivega homo ĉiujn sensojn.

En « la Forto de la Fato » de Verdi, la kuracisto,

kvankam li ne aperas, eltiras kuglon el la brusto de la heroo. La operacio bone sukcesas, kiel ni povas konstati dum la sekvanta akto, laŭ la voĉa vicleco de Don Alvaro.

La demonia Doktoro Mirakel (Dro Miraklo), en la « Fabeloj de Hoffmann » de Offenbach, devigas Antonia-n, kiu estas tuberkuloza, kanti sian propran morton dum li akompanas ŝin per sia magia violono.

Oni scias ke Hoffmann ne sukcesis komponi sen la incitado de alkoholo, kaj la alkoholojn li ŝanĝis laŭ la komponenda muziko. Por la poreklezia muziko li konsilis maljunan Bordeaux aŭ Reĵnan vinon, por la farsopero, la ĉambron, por la lido, la Ĉiantu aŭ aliajn italajn vinojn, kaj por la romantikaj arioj, glason da punĉo.



« La Frizisto el Bagdad », ne estas kuracisto, sed sin rigardas tiel, pro sia vasta sperto. Li anoncas per sia basa voĉo, kiel li esperas kuraci Nureddin, la tenoro. Oni okazigas al li kelkajn malagrablajn ŝercojn, sed, fine, li havas la plezuron uzi siajn talentojn, por revivigi Nureddin, kiu estas senkonscia kaj mortaspekta.

Urgaj helpoj

Richard Strauss, dufoje, enscenigas kuraciston, en malgravaj roloj, sed vere medicinaj. En « Der Rozen Kavalier », iu kuracisto donas urgajn helpojn al Barono Ochs, ete vundita de la spado de Oktavien. En « Arabella », duelo estas antaŭvidita de Waldner kaj Mandryka, kaj, en la lasta akto, du kavaleriaj spadoj, kaj du pistoloj estas alportitaj sur la scenejo, dum kuracisto sin tenas preta por interveni. Tamen Arabella ne estas tragedio sed lirika komedio, kaj la duelo ne okazas. Tial la kuracisto eliras sen kanto de ia eta noto, kaj sen kuracado de ia eta vundo.

Amiga trinkajo

Ni ne forgesu Doktoron Dulcamara-n, en « Elisir d'Amore », de Donizetti. Kvankam, fakte, li estas ĉarlatano, la amiga trinkajo, kiun li preparas, kaj la bombasta recepto, kiun li konsilas al la kredema amaso, pravas, iamaniere, la konsideron kiun la kuracistoj ĝuis dum la unua kvarono de la 19-a jarcento. « Longe vivu Doktoro Dulcamara ! » oni krias entuziasme. Bedaŭrinde estas ke la realeco ne estas la fikcio...

Esperantigis Dro J. Dumas.

(Artikolo verkita por « Pulse-International »).

FANTAZIAĴOJ

HOMO - KIEL MAŜINO

El la konataj maŝinoj, la homo certe estas unu, kies produkto-kvanto plej etas.

Li ne povas esti utiligita pli ol unu trionon de la tago, t. e. 8 horoj el 24, kaj maloftaj estas la okazoj en kiuj li laboras pli ol 4 horojn sinsekve sen interrompo. Krom tio, lia vivtenado kostas multe... Kiam oni kalkulas la loĝelspezojn, la semajnan revizion de l'dimanĉo, la grandan de l' jaro (ferioj !), la impostojn, la asekurojn, la grandan konsumadon de ĉiaj karburajoj (3 decilitroj !), oni atingas impresan sumon...

Kaj lia kosto ! Terura ! 30 jara, en la momento de plenaj kompetentecoj, kiam li plej bone funkcias, la plej malbona homo, malkaŝe, kostis po mil frankojn por kilogramo ! Oni devas vere konfesi, ke tio estas tre multekosta.

Aliparte, ĉar oni ne povas amortizi lin, pro sentimentalaj motivoj, ankoraŭ tre potencaj, lia valoro tiam pli grandiĝas ankoraŭ, kiam lia produktivo malpliĝas, estas la kulmino de mallogiko !

Finfine, la homo, rigardata kiel maŝino, kiel ilo, bezonas, antaŭ ol lia praktika utilo,

tre longan periodon da preparadoj, da provoj : proksimume 20 jarojn da erodado, meznombre....

Sekve, iom post iom, li lertiĝas en la postulotaj kvalitoj, sed tiel malrapide, ke en la tempo, kiam ni opinias, ke li ekposedas ilin, oni rimarkas, ke la ĉefaj partoj de la maŝino estas jam malfortaj, eĉ tute uzdifektitaj. Oni plibonigas la detalojn, sed la tutaj oĝis neripareble difektita.

Antaŭ nelonge oni opiniis, ke estus pli bone nutri la maŝinon ĝis kompleta eluzo, profitante de ĝia produktokvanto pli kaj pli eta.

Hodiaŭ, ĉion kalkulinte, oni konsideras pli taŭga ekonomio, subteni la maŝinon, post ioma aĝo, per minimumo da elspezoj por la ŝmirado, sen igi ĝin labori. Tiamaniere, oni gajnas ion, kaj la emerita motoro povas esti ankoraŭ honorinde enskribita en la inventaro.

Vendi ilin po pezo de neripareblaj maŝinoj, por sin liberigi ! Pri tio ne povas esti eĉ penso. Unue, oni trovos nenian aĉetanton, alie, tiaj maŝinoj povos okaze esti.... uzindaj.

LA HOMO KAJ LIA AŬTOMOBILO

Mi pardonpetas, karaj samideanoj, de nove priparoli pri tiu gurdita temo, sed ĝi estas aktuale arda, kredu min, sinjoroj, jes, mi volas paroli pri : « La viro kaj lia aŭtomobilo. »

Jes, nu ! ni ja estas ĵaluzaj, ĉar por diskuti pri ĝi, vi trovas ton-nuancojn, kiujn vi neniam havas, kiam vi parolas pri Ni ; ĉar vi estas multe pli fieraj pri ĝia vigleco aŭ potenco, ol pri nia kapablo aŭ aktiveco, pri ĝia eleganta staturo, ol pri la nia. Vi multe pli zorgoplene okupiĝas pri ĝiaj mekanikaj difektoj, ol pri niaj fartaj perturbedoj...

Tuj kiam malvarmiĝas, vi timtremas pro ĝi, kaj vi eĉ ne ekspensas nin kovri kaj protekti je peltoj...

Vi zorgege kaj hordaŭre tualetigas ĝin, sed vi grumblas, kiam ni uzas, pasigas tro da minutoj por fariĝi belaj... por... Vi...

Ho ! certege kaj nepre ni preferas ĝin ol iu alia el karno kaj ostoj... virino ! Sed, tamen, kiam por via datreveno, vi ŝanĝas ĝin, ĉiujare, ni ekĝemetas, revante pri la broŝo, kiun vi donace forgesos por la... nia !

Kion vi pripensas, karaj samideanoj ?

HÉLÈNE CHAVAN.

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO - (Vidu la regularon en la antaŭa numero)

Unua problemo (20 poentoj)

En la ĉisubaj frazoj, bonvolu anstataŭigi la punktojn per la taŭgaj vortoj.

1. — Ni povas nenion ami, ... rilate al ni.
2. — Mi ne foriros antaŭ ĉio estos preta.
3. — Samaj kaŭzoj samajn efikojn.
4. — La homo faras mem destinion, kion ajn vi povas diri.
5. — La riĉeco aperigas niajn virtojn kaj malvirtojn, ... la lumo la objektojn.
6. — Homoj ne longe vivus socie, ... ili ne estas trompitaj de la aliaj.
7. — Li havas malpli spriteco ol li kredas.
8. — pli oni havas, ... pli oni avidas.

Atentu : Estos kalkulitaj 2 poentoj por ĉiu taŭga vorto, sed estos forprenita 1 poento por ĉiu malgusta vorto.

Dua problemo (20 poentoj)

Korektota teksto. — En la sekvanta rakonteto estas 20 lingvaj eraroj. Bonvolu serĉi kaj korekti ilin.

« Laŭta telefonkrakado vekigis la doktoron el

profunda dormo. Estis unu el siaj pacientoj, juna viro, kiu estis tre ekscitinta. « Mia edzino, li kriis, estas tre malsana per ŝia blinda intesto. Bonvolu venu rapide ! » La kuracisto oscedis kaj konsilis al la juna viro, ke li enlitiĝos. « Donu al ŝi iom de aspirino aŭ spruĉakvo, kaj morgaŭ mi vizitos ŝin. Sia blinda intesto certe ne povas ĝeni vin. » La edzo en la alia fino de la telegrafinio iĝis ankoraŭ pli malpacienca kaj persistis, ke sia edzino havas inflacion en la blinda intesto. « Tio ne estas eble ! respondis la kuracisto kolere. Antaŭ tri jaroj mi eloperaciis ŝian blindan inteston kaj mi neniam aŭdis de homo kun du blindaj intestoj ! » — « Kaj ĉu vi aŭdis pri homo kun du edzinoj ? kriis la viro amare. » « Tion aŭdante la kuracisto forrapidis. Estis bona, ke li iris, ĉar la dua edzino de la viro efektive havis danganan malsanon en ŝia blinda intesto. »

Estos kalkulitaj 2 poentoj por ĉiu eraro ĝuste korektita, sed estos forprenita 1 poento por ĉiu eraro malĝuste korektita.

Sendu viajn respondojn aŭtaŭ la 31-a de Januaro 1966, al S-ro P. Chevalier, 19, Bd. G.-Lauriol, 44-Nantes, Francujo.

AMUJAZ PROBLEMOJ (apartaj de la konkurso)

En Bolonjuo

Kiam la unuaj aŭtomobiloj estis aĉetitaj de Bolonoj, la registaro de tiu (nekonata) lando decidis, ke la aŭtomobil-posedantoj skribos sur la legitimiga ŝildo ne nombron sed grupon de tri malsamaj literoj, kiujn ili provos ordigi laŭ sia propra deziro (ekz. TAC-ACT-ATC ktp.). Sed kiam pli

grandiĝis la nombro de la aŭtomobiloj, ne plu sufiĉis la nombro de la literoj de la Bolona alfabeto. La registaro kalkulis, ke se oni devigus la aŭtomobilistoj skribi ne tri, sed grupo de kvar malsamaj literoj (ĉiam ordigitaj laŭ la deziro de la aŭtomobilistoj), oni povus kvinoblige la nombron de la tiamaniere registritaj aŭtomobilistoj. Kiom da literoj posedas la Bolona alfabeto ?

La Kvadrato

1	2	3	4
5	6	7	8
9	10	11	12
13	14	15	16

La apuda kvadrato entenas la 16 unuajn nombrojn. Kiamaniere loki la nombrojn en la fakoj por ke la sumo de la kvar nombroj de horizontala, vertikala aŭ diagonala linio estu 34 ?


PER BONHUMORO GRAMATIKO

« La vorto « po » antaŭ iu esprimu de mezuro signifas, ke tiu mezuro rilatas ne al ĉiuj personoj aŭ objektoj kune, sed al ĉiu aparte ; ekzemple : ili ricevis po kvin pomoj = ne ĉiuj kune ricevis kvin, sed ĉiu el ili aparte ricevis kvin pomojn ; la drapo kostas po du spesmiloj por metro = ĉiu metro (ne la tuta drapo) kostas du spesmilojn ; ili vendas pogrande = ĉiu aparta porcio, kiun ili vendas, estas granda (t.e. ili vendas nur grandajn porciojn). Oni ne povas diri « je 80 centimoj po funto » aŭ « 30 mejlojn po horo » sed oni devas diri « po 80 centimoj por ĉiu funto » « po 30 mejloj en horo ».

(L.L. Zamenhof. Lingvaj Respondoj).



— Mi bezonas tri ŝparmonuojn ; mi metos mian monon po dek frankoj en ĉiun.




— Mi finis tiun pentraĵon, laborinte dum 10 tagoj po unu horo.



— Oni ne diris al ni, ke ni loĝos po 2 aŭ 3 en ĉiu ĉambro !

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (39 aŭst. ŝil.).
Belujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (70 fr.).
Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (10 ŝil.).
Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Bana Cigel, PRIEDVIDZA (1,50 us. dol.).
Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (10 kr.).
Finnlando : S-ino Kerttu Väättänen, Mäntyläntie 4, LAPPEENRANTA 5 (6,2 mk.).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33, - pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (5,6 mk.).
Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1º, la, BARCELONO (77 pes.).
Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (840 lir.).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtako 239 (1260 d.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (5 guld.).
Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg. 56, LAMBERTSEDER (10 kr.).
Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (50 zł.).
Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk. 157007 (8,4 kr.).
Svislando : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).
Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (1,50 us. dol.).
Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (1,50 dol.).
Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo